

La 1an de oktobro 2016

Usonaj misiistoj, kiuj pardonpetis de okinavanoj

Antaŭ kelkaj semajnoj venis al mi letero el Okinavo. La sendinto estis s-ro Higa Koobun, eksa ĵurnalisto de Okinaŭa Times. Li ne estas esperantisto, sed havas intereson pri ĝi kaj verkis libron pri s-ro Jui Ĉuunoŝin, esperantisto, kiu bruligis sin antaŭ la parlamentejo en Tokio en novembro 1967, protestante la politikon de tiama ĉefministro Satoo Eisaku pri la Vjetnama Milito.

S-ro Higa dankis min pro mia raportado pri Okinavo kaj sendis siajn artikolojn aperintajn en diversaj revuoj. Hodiaŭ mi tradukos unu el tiuj.

“Usonaj misiistoj, kiuj pardonpetis de okinavanoj”

Higa Koubun

Post la dua mondmilito 10 kristanaj organizoj en Usono sendis al Okinavo helpmaterialojn nomatajn “materialojn de LARA (Licensed Agencies for Relief in Asia)” konsistantajn ĉefe el nutraĵoj kaj vestaĵoj. Tiuj multe helpis okinavanojn, kiuj perdis preskaŭ ĉion en la milito.

Aparte de tiu helpo, usona misiisto Harbert Nicholson kunportis 200 kaprojn al Okinavo. Li estis en Japanio antaŭ la milito, do li estis lerta en la japana lingvo. Dum la milito li revenis al Usono kaj prizorgis japanajn retenitojn en koncentrejoj en Usono kiel malamikojn.

S-ro Nicholson vizitis diversajn lokojn en Okinavo kaj disdonis tiujn kaprojn, dirante al okinavanoj: “Pardonu nin, usonanojn, kiuj faris tiom kruelajn aferojn al vi”. Li petis pardonon de eksaj venkitaj malamikoj, kvankam li apartenis al Usono, venkinto. Loĝantoj, kiuj renkontis lin, eksciis kun kolero, ke Japanio ĵetis Okinavon en la militon, sed neniu japano pardonpetas de ili pro tio.

Dum la milito usonanoj disĵetis flugfoliojn el aviadiloj, sur kiuj estis skribite: “Ĉu tiu ĉi milito estas tiu de la okinavanoj aŭ tiu de la japanoj?” Usono komprenis, ke okinavanoj ne estas japanoj kaj ke Okinavo estas uzata



kiel ŝildo por Japanio. Post la milito usonaj soldatoj venis kaj kriis de ĵipo aŭ de kamiono al ni: “Japanoj estas malbonaj, japanoj estas malbonaj!” Mi kiel okinava knabo bone memoras tiun scenon.

(Foto: familio de Nicholson. En la unua vico

dekstre Harbert Nicholson, meze lia edzino, kaj la aliaj estas iliaj gefiloj.)

Antaŭ la milito Okinavo havis plej multajn kaprojn en Japanio, do mi opiniis, ke pro tio Harbert kunportis kaprojn, sed mi eraris. Por kristanoj, kaproj estas oferaĵoj por redemptoro. Nun mi komprenas, ke Harbert disdonis tiujn kaprojn por peti pardonon.

Post la milito multaj misiistoj estis senditaj al Okinavo. En mia vilaĝo estis misiisto nomata Matthews. Ankaŭ li preĝis: “Pardonu Usonon, kiu suferigis okinavanojn”, same kiel Harbert. Tiuj agoj de usonaj misiistoj donis grandan impreson al okinavanoj. Japana armeo uzis Okinavon kiel ŝildon por protekti Japanion, sekve kvarono de la okinavanoj fariĝis viktimoj, sed la japana registaro neniam pardonpetis de Okinavo. Pro tio okinavaj patrinoj, kiuj perdis siajn edzon kaj infanojn, kritikis Japanion, dirante, ke Usono estas Dio, male Japanio estas diablo.

Iuj, kiuj aŭdis preĝon de tiuj misiistoj kun emocio, vokis: “Ne nur Usono estas malbona, sed ankau ni. Ankaŭ ni devas preĝi, pardonpetante”. Pardonpeto de unu homo movis aliajn homojn, kaj tiamaniere interkompreno disvastiĝis.

En majo venis usona prezidento Obama al Hiroŝima. Li proksimiĝis al suferantoj de la atombombo kaj brakumis ilin. Tio estis tre emocia. Al mi ŝajnis, ke la prezidanto, kies lando faligis atombombon sur Hiroŝima antaŭ 70 jaroj, kaj la suferantoj pro tio, kune antaŭenpaŝas por la mondo sen nukleaj armiloj.

Antaŭ lia alveno al Japanio, ĉu li pardonpetos aŭ ne estis nia intereso. En Hiroŝima li ne pardonpetis. Laŭ la ĵurnaloj multaj usonaj veteranoj aprobas la faligon de atombomboj sur Japanion, ĉar se Usono ne uzintus la atombombojn, ĝi ne povintus fini la militon frue, sekve ekestintus pli da usonaj viktimoj. En ilia kapo estas fikse

restas memoroj pri “Morta marŝado en Bataan” kaj aliaj kruelaj agoj de japanaj soldatoj al usonaj kaptitoj.

Dum la milito la japana armeo marŝigis 76000 usonajn kaptitojn 110 kilometrojn en la suno sen sufiĉe da nutraĵoj en la duoninsulo Bataan en Filipinoj kaj mortigis 17200 homojn. Krom tio, japana armeo faris multajn kruelajn agojn, ekzemple masakron en Nankino en Ĉinio kaj en la Malaja Duoninsulo, sekssklavigon de multaj aziaj virinoj, ĝismortan laborigon de britaj kaptitoj por konstruado de la fervojo inter Tajlando kaj Mjanmaro, mortigon de du milionoj da vjetnamoj pro malsatego, rabinte rizon de ili, medicinajn eksperimentojn pri ĉinaj kaj rusaj kaptitoj en la nordorienta regiono de Ĉinio, trudon de sinmortigoj al okinavanoj ktp.

Okaze de la 50-jariĝo de la fino de la dua mondmilito en la japana parlamento oni adoptis rezolucion pri “profunda memkritiko” pri la milito kaj dissendis ĝin al la mondo, sed en la tiutempa parlamentejo, tiuj, kiuj ĉeestis kaj aprobis la rezolucion, estis nur iom pli ol duono de la parlamentanoj, dume la alia duono forkuris, ne volante aprobi ĝin. Tiamaniere Japanio ne estis pozitiva pri tiu rezolucio. Se Obama pardonpetus pro la atombombadoj, ankaŭ la ĉefministro Abe devus pardonpeti de aziaj landoj. Mi suspektas, ke “sen pardonpeto” de Obama estas konspirata de ambaŭ registaroj.

Japanio sekvu la ekzemplojn de tiuj usonaj misiistoj kaj sincere pardonpetu de aziaj landoj por ke ĝi liberigu sin de la negativaj heredaĵoj de la milito.

(fino de la traduko)

Kontraŭbatalo de okinavanoj

Japanio ne nur ne pardonpetas de Okinavo, sed ankaŭ daŭre kolonias kaj viktimitas ĝin. La plej granda trudo estas konstruo de la nova usona militbazo Henoko, anstataŭ la nuna bazo Futenma plej danĝera en la mondo situanta meze de la urbo Ginoŭan (kie s-ro Higa loĝas). La registaro insistas, ke por eviti la danĝeron, la konstruo de la nova bazo en la maro de Henoko estas la sola elekto, sed en efektiveco tio signifas, ke Okinavo vivos 200 jarojn kun tiu plej moderne ekipita granda militbazo. La guberniestro kaj okinavanoj kontraŭbatalas la registaron.

Nun alia trudo okazas. Tio estas konstruo de Areoj por helikoptera surterigo en la distrikto Takae de la vilaĝo Higaŝi.



En 1996 Usono konsentis redoni duonon de la Norda Trejnejo al Japanio kondiĉe, ke Japanio, ne Usono mem, konstruu 6 Areojn por helikoptera surterigo proksime de la distrikto Takae. Jam du estis konstruitaj, al kiuj ofte venas aviadiloj nomataj Pandionoj (angle Osprey). Ili povas ekflugi vertikale kiel helikopteroj kaj ankaŭ flugi kiel aviadiloj. Kiam ambaŭ registaroj konsentis pri la konstruo de tiuj areoj, la loĝantoj tute ne antaŭvidis alvenon de Pandionoj. Tiu aviadilo estas tute malsama ol helikoptero, estigante grandan bruon kaj venton.

En la distrikto situanta en la subtropika arbaro loĝas 160 vilaĝanoj. Kiam tiuj 6 areoj estos konstruitaj, la vilaĝo estos ĉirkaŭata de ili. Super la distrikto tagnokte flugas helikopteroj. Se Pandionoj komencos flugi, la loĝantoj ne plu povos loĝi tie pro la bruego. En julio 2007 la vilaĝanoj komencis sidadi antaŭ la enirejo por bloki la konstruadon.



(Foto: el interreto. Fotita de la ĵurnalo Asahi. La arbaro trans la areoj apartenas al la nacia parko Janbaru.)

En ĉi-julio la registaro komencis konstruadon de la aliaj 4 areoj, enkondukinte 500 policanojn el ekster

Okinavo. Ĝi eĉ uzas helikopterojn de la japana defendkorpuso kontraŭleĝe por transporti materialojn kaj maŝinojn. Nun kontraŭbatalo de okinavanoj kaj subtenantoj el ekster Okinavo plifortiĝas.

La japana registaro trudadas usonajn militbazojn preskaŭ nur al Okinavo. Tio estas grava diskriminacio al Okinavo kaj viktimitigo de Okinavo same kiel antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Vere Japanio estas diablo, kaj nun ankaŭ Usono estas diablo.